


kontakto



**N-ro 4,
Volumo
7/1970**

Kontakto revuo de TEJO

Redaktoroj

Hans Zeilinger
Simo Milojević
Ulrich Lins

Adreso de la redakcio: Hans Zeilinger,
Am dicken Turm 4/1, D-87 Würzburg,
FR Germanio, tel. 42762.

Administrejo, al kiu oni sendu ĉiujn abon-
kotizojn, reklamojn ktp.: *Kontakto*, Uni-
versala Esperanto-Asocio, Nieuwe Binnen-
weg 176, Rotterdam-3002, Nederlando.
— Banko: Mees & Hope, Blaak 10, Rot-
terdam-3001, Nederlando. — Poŝta ĝir-
konto: 378964 (UEA).

Presejo de tiu ĉi numero: Grafisch Bedrijf
Tuijtel, Hardinxveld, Nederlando.

MANUSKRIPTOJN POR KONTAKTO

oni sendu al la redaktoro en du ekzemple-
roj; ili devas esti klare tajpitaj en korekta
Esperanto, ĉiuj supersignoj devas aperi laŭ

ĝusta formo, se necese enskribitaj perma-
ne. Oni skribu sur unu flanko de la pape-
ro kun interlinia spaco kaj granda mal-
dekstra marĝeno. Manuskriptojn nepetit-
ajn la redaktoro ne devas resendi. Li ha-
vas la rajton laŭ sia bontrovo modifi arti-
kolojn. Pri la enhavo de la artikoloj res-
pondecas nur la subskribintoj mem, kies
opinio ne nepre akordiĝas kun opinioj aŭ
principoj de TEJO kaj de la redakcio.

Abonprezo: 8 ned. gld. jare (por gejunu-
loj ĝis inkl. 25 j. 5 ned. gld.) — kun la re-
vuo *Esperanto* kaj la Jarlibro de UEA:
22,50 ned. gld. (gejunuloj ĝis inkl. 21 j.)
resp. 30 ned. gld. (ĝis inkl. 25-j.) — kun
la bulteno *Novaĵoj* de TEJO: minimume
16 ned. gld. (Patronaj Membroj).

Individua numero: 2,20 ned. gld.

Reklamtarifo: 95 gld. por tuta paĝo.
1/2 p. = 55 gld. 1/4 p. = 35 gld.

Estraro de TEJO

Humphrey Tonkin, prezidanto, 35 Violet
Lane, Lansdowne, Pa. 19050, Usono.

Senad Čolić, ĝenerala sekretario, Halilba-
šića 23, Sarajevo, Jugoslavo.

Hans Eichhorn, vicprezidanto, Rosenfeld-
er Str. 2a, DDR-113 Berlin, GDR.

Jeanne-Marie Liouville, vicprezidantino,
Binnenkant 46, Amsterdam C, Nederlando.

Hans Michael Maitzen, vicprezidanto,
Markstr. 293, D-463 Bochum, FRG.

Ulla Luin, kasistino, Myggdalsvägen 123,
S-135 00 Tyresö, Svedio.

Renato Corsetti, vicsekretario, Via Stra-
bone 1, I-00176 Roma, Italio.

Flóra Szabó, sekretariino de la Komitato,
Várady Antal u. 4, Pécs II, Hungario.

Marek Lassak, Studenta Scienca Rondo
de Esperantistoj, Universitato N. Koper-
nik, Mickiewicza 6/10, Toruń, Pollando.

Uwe Joachim Moritz, Andreasstr. 57,
D-5161 Merken, FRG.

Tiu ĉi numero

prezentiĝas al vi kun iom alispeca tek-
nika aspekto. Por klarigi tion ni ris-
kas tedi vin per malnova gurdajo:
TEJO ankoraŭ ĉiam baraktas kun
grandaj financaj malfacilaĵoj, tiel ke
ni estas devigitaj daŭre esplori ŝpar-
eblecojn, i.a. rilate la presmanieron
de *Kontakto*. Tial ni eksperimen-
te kompostigis tiun ĉi numeron en la
Centra Oficejo de UEA. Per tiu vojo
ni samtempe celas plirapidigi la
aperon de la lasta ĉijara kajero, esper-
ante ke en 1971 ni sukcesos entute
reguligi la eldonan ritmon.

La enhavo

ankaŭ diferenciĝas de antaŭaj nume-
roj, ĉar la redaktoroj donis preferon
al diskutaj kaj diskutigaj kontribu-
aĵoj: Estraranoj Tonkin kaj Maitzen
analizas la postkongresajn perspekti-
vojn por TEJO, kaj D-ro Szerdahelyi
(en artikoleto represita el *Literatura*
Foiro, nova periodaĵo en Italio) kon-
igas siajn observojn pri la avangarda
lingvaĵo de junaj esperantistoj, kiu ce-
tere impresis eĉ la usonan semajnr-
evuon *Time* Artikolo pri la fa-
man franca filozofo kaj verkisto Jean

Paul Sartre klopodas pritaksi la nu-
najn poziciojn de tiu geniulo, kies
glorstelo ŝajnas subite paliĝi; aparta
atento en tiu artikolo (kiun cetere
publikigis pluraj revuoj) estas dedi-
ĉita al la rilatoj de Sartre kaj la nuna
junularo. Por substreki la fierigan
senton, kiun donas la konscio povi
kalkuli personon kiel Franz Jonas al
niaj vicoj, ni aperigas kelkajn liajn el-
dirojn el antaŭaj jaroj. Konkludojn ni
lasas al niaj legantoj, sed unu konsta-
to ŝajnas pravigebla: Lia opinio pri la
rolo de Esperanto en la nuntempa
mondo restis mirinde konsekvenca
tra la jardekoj, kaj anstataŭ siaflanke
transiri al la „neŭtrala“ movado kun
ĝiaj antaŭmilite tiom fortimigaj traj-
toj, li iom post iom notis proksimi-
ĝon de la movado al siaj junulaj ide-
aloj.

Krome, ni dediĉas iom pli da spaco
ol kutime al la opinioj de legantoj.
Espereble tio provokos pliajn reagojn
— egale ĉu temas pri laŭdo aŭ kon-
damno.



„Vi verŝajne kredas, kvazaŭ mi ne sci-
us pri via agado tie supre! ”

Humphrey Tonkin:

Fundamentoj de nia agado

La unua kongreso post la Deklaracio de Tyresö, nome tiu en Graz, alportis tri novajn postulojn, kun akompanaj problemoj kiujn ni sukcesos solvi nur kun la tempo kaj la bona volo. La postuloj estas: preteco, fleksebleco, kaj prioritatoj.

Entenata en la spirito de Tyresö estis la supozo, ke en estontaj jaroj niaj kongresoj havos karakteron de forumo, en kiu la junaj geesperantistoj preparolos difinitan kongresan temon aparte aktualan tiutempe. La sukceso de tia entrepreno dependas de preteco. Unue, la Loka Kongresa Komitato devas pretigi ne nur la kutimajn kongresajn programerojn, kiel en antaŭaj jaroj, sed ankaŭ specialajn erojn kongruajn al la kongrestemo. Tiun temon oni devas elekti tre zorge, trovante taŭgajn prelegantojn kaj referantojn por ĝin prezenti, kaj preparante necesan skriban dokumentadon anticipe kaj dumkongrese. Due, la kongresanoj devas pretigi sin, tiel ke ili venu al la kongreso pretaj partopreni la diskutojn. Tia pretiĝo konsistas unuavice el simpla ekscio kaj pripenso pri la problemaro, kaj prefere ankaŭ el studado ĝuste de la propralandaĵaj aŭ lokaj cirkonstancoj, tiel ke oni povu mem kontribui ion al la diskutata temo.

Mankis serioza diskutado

La sperto en Graz estis relative negativa koncerne ambaŭ punktojn. Kvankam la kongresa temo memevidente havis sian aktualecon, apenaŭ okazis vere serioza diskutado pri la celoj kaj praktikoj de la hodiaŭa edukado, kaj tute mankis tia kristaliĝo de la pensoj kiel pasintjare en Tyresö. Unu kialo de tio estis manko de direkto kaj direktiĝo en la diskutoj; alia estis la simpla fakto, ke niaj kongresanoj ŝajne malmulte pripensis la lernsistemon en kiu ĝuste la plimulto nuntempe mueliĝas.

Sub la ĝenerala temo „preteco“ oni devas ankaŭ konsideri pretecon por novaj formoj de diskutado kaj novaj manieroj de pensokonfliktoj. Estas nenia dubo, ke TEJO ne estis *organize* preta por glate akcepti la fortan kolizion de idealoj kiu okazis en Graz. Principe, pluralisma organizo kiel la nia povas facile akcepti en sian sinon plej diversajn opiniojn kaj ideojn, sed en la praktiko tia principo antaŭsupozas atmosferon de reciproka fido kaj bonvolemo. Reciproka fido ekzistas nur tiam kiam homoj povas paroli trankvile (kvankam kun urĝo proporcia al la temo), fari decidojn pace, kaj apliki decidojn honeste kaj firme. Trankvilo, paco, honesto, kaj firmo estas eblaj nur



Komisiona kunsido dum ekskurso en Graz: Meze kaŭras Humphrey Tonkin, maldekstre apud li Hans Eichhorn, nova vicprezidanto de TEJO.

Foto: U. kaj F. Luin

kiam kongreso estas bone organizita, homoj ne estas lacaj, kaj oni evitas minacojn, akuzojn, kaj kontraŭakuzojn. Al Graz venis TEJO-estraro ŝokita kaj lacigita pro eksterordinara streĉiteco dum la Universala Kongreso kun la estraro kaj komitato de UEA, LKK komplete elĉerpita pro lastmomenta organizado kaj pro diversaj lastminutaj problemegoj (ekzemple pri loĝigo), kaj kongresano konfuzita pri la kongresa temo, aŭ sen scio pri TEJO kaj ties idealoj. Ke la kongreso entute finiĝis en bona ordo estas en si mem miraklo, kaj ke okazis dum la kongreso eksterordinare viglaj kaj vervigaj diskutoj pri niaj idealoj estas absolute salutinde. Sed la kongreso ne atingis tion, kion ĝi kapablas atingi. Kaj la kialo estis nia nepreteco.

*

En usonaj universitatoj en la lastaj jaroj regis kvazaŭ ne-skribita principo, ke diskutado inter studentoj kaj ilia profesoro estas pli efika maniero de lernado, ol simpla sidadado dum la profesoro prelegas. La emo al diskutado anstataŭ prelegado respegulas la pli demokratiajn tendencojn en moderna universitata edukado, kaj konsistigas salutindan konstaton, ke la profesoro ne laŭnecese konas ĉiujn respondojn aŭ havas monopolon pri sagaco.

Tamen, ekzistas risko, ke la diskutado fariĝos pli alte taksata, ol ĝi meritas. Profesoro kiu diskutigas siajn studentojn, senkonsidere pri la stulteco aŭ senceleco de la diskutoj, estas kelkfoje pli alte estimata ol profesoro kiu saĝe kaj efike prelegas. Sed diskutado, interŝanĝo de pensoj, ne estas en si mem bonaj. Bonas nur la rezulto. Se oni vere lernas per diskutado, tiam ĝi havas valoron; se ne, tiam oni elektu alian manieron de lernado.

Gravas la „spirito“ de Tyresö

Oni povas apliki la saman principon al nia agado en TEJO, kaj precipe al la Deklaracio de Tyresö. Diskutado pri la preciza interpreto de la Deklaracio, kaj postulado, ke oni pli klare difinu kaj vortumu ĝiajn diversajn punktojn, kondukas miaopinie nur al sterileco. En la monatoj post Tyresö oni ofte parolis pri la „spirito“ de Tyresö: la forto de la Deklaracio kuŝas en ĝia *spirito*, ne en ĝiaj literoj. Pri tiu spirito ni ĉiuj havas pli-malpli klaran ideon. La dokumento esprimas simpatian kaj subtenon al la junulara movado — ne la sveda, aŭ usona, aŭ itala, aŭ pola junulara movado, sed tiu ĝenerala mobilizo de la konscio kaj konscienco de la tutmonda junularo, kiu esprimiĝis sur diversaj politikaj kaj sociaj frontoj.

Ĝi konstatis la ligan inter la lingvo kaj demandoj socipolitikaj, kaj ĝi agnoskis, ke nia poresperanta agado devas esti vidata en la kunteksto de la lukto kontraŭ ĉia subpremado, ĉia maljusteco. Ĝi ne nomis la subpremadon en difinita lando, aŭ de difinita socia klaso; ĝi ne difinis ĝuste *kian* maljustecon oni kontraŭbatalu. Ĝi mencias diskriminacion, sed aldonis la vortojn „en ĉiu formo“, tiel ne limigante sin al diskriminacio en unu lando sed ne en alia, aŭ en unu situacio kaj ne en alia situacio.

La kerno de la dokumento, kaj la pensofadeno kiu traktas kaj unuigas ĝin, estas respekto de la rajtoj de la individuo. Diskriminacio kaj imperiismo, samkiel ekologia detruo kaj psika subfosado, estas atencoj kontraŭ la individuo. Pro tio ili estas kondamnindaj. La lingvo estas ĉefa esprimilo de la personeco: per la lingvo la homo voĉigas sian individuecon. Tiel ni konstatas, ke, ĝuste kiel la lingvo estas intime ligita al socipolitikaj demandoj, socipolitikaj demandoj havas sian fundamenton interalie en la lingvo.

Inspiri kaj direkti

Tiuj ĉi konstatoj de la Deklaracio estas valoraj ĝuste pro sia vasteco. Kvankam estas eble kelkaj inter ni kiuj ne povas akcepti la emfazon de *personaj* rajtoj kaj la netuŝebleco de la individuo, la granda plimulto povas trovi en la Deklaracio inspiron por la daŭranta batalo kaj fonton de ideoj kaj principoj.

Sed tio, kompreneble, estis la celo de la Deklaracio: inspiri kaj direkti. La Deklaracio estis konceptita kiel *kadro* por niaj debatoj, kaj kiel gvidilo en la laboro. Se ni sidas kaj ekzamenas ĉiun unuopan eron de la Deklaracio, ne por esplori la ideojn kaj faktojn malantaŭ tiu ero, sed por plidifini la vortumon, ni perdas nian tempon. Se ni limigas ĝian signifon, ni kvazaŭ invitas al formiĝo de klikoj, kaj al ekziĝoj, kaj al malfondo. La valoro de la Deklaracio kuŝas en la apliko, ne en ĝiaj vortoj.

Deklaracio bazita sur respekto de la individuo entenas laŭdifine spiriton de fleksebleco. Mi dubas ĉu bulgaro, usonano, alĝeriano, kaj hindo aplikus la Deklaracion en ĝuste sama maniero en siaj diversaj loĝlokoj. Sed en tia grado kiel la Deklaracio entenas universalajn principojn, kaj en tia grado kiel niaj homoj respektas ĝian spiriton, tiuj aplikigoj diversaj kongruas kun la idealoj de la Deklaracio.

Spiriton de fleksebleco ni devas ankaŭ koni en nia interna agado. Se ni ne povas cedi pri detaloj, se ni ne povas respekti alies opiniojn pri bagateloj, ni neniam sukcesos fronti gravaĵojn, nek pace trakti pri esencaĵoj. Kaj sen respekto, efika agado ne eblas.

*

Ĉikanado pri detaloj estas klasika ekzemplo de konfuzo inter tio kio gravas kaj tio kio bagatelas. Eternaj statutbataloj estas signoj de ŝtoniĝo, aŭ simptomoj de morto. Organizoj kiuj bankrotas pri ideoj ofte sin turnas al senfina pritrakto de neesencaj demandoj, foruzante energion disipatan pro celomanko. Disputoj pri detaloj en laborplanoj, aŭ pri vortumo de Deklaracioj apartenas al sama kategorio.

Vi eble respondos, ke ĝuste la vortumo determinas la sencon, kaj ke diskutoj pri vortumo estas ofte gravaj. En ideala mondo vi pravus, ĉar en ideala mondo la tempo starus. Sed ĉe ni ĝi kuras. Por TEJO, la tempo por rekta senpera diskutado estas ĝuste sep tagoj ĉiujare. Dum la pasintaj dek jaroj la ideologoj de TEJO kune paroladis dum malpli da tempo ol estas entenata en kutima lerneja studperiodo. Kiam oni laboras sub tiaj cirkonstancoj, valora eluzo de ĉiu minuto estas esenca.

Ni devas esti dankemaj, ke niaj homoj entute havis la okazon kune paroli. Ili povis tion fari nur ĉar la organiza strukturo tion permesis. Nur ĉar TEJO sukcesis ĉiujare organizi sian kongreson, ili renkontiĝis. Ili plejparte utiligis, aŭ devis utiligi, tiujn kongresajn tagojn je diskutado direkta al agado — ĉar finfine la agado estas la esenco de niaj laboroj.

Nia unua zorgo: la bonfarto de TEJO

Agado antaŭsupozas diskuton; diskutado anstaŭsupozas organizan strukturon. Ŝajnas do, ke esenca elemento en ĉiu sukcesa pritrakto de nia problemaro estas efika administrado. Reemfazi tion ne signifas konsideri ĝin *celo* de nia laboro: oni ja ne intermiks la aparaton kun la produktaĵoj de tiu aparato. Sed sen organiza fortenco ni estas senpovaj antaŭ la mondaj demandoj kiuj ricevas pritrakton en niaj kunsidoj kaj kongresoj.

Pro tio, ekzistas unu ora principo kiun oni tre facile preteratentas kaj kiu bezonas substrekon. La bonfarto de nia Organizo devas esti nia unua zorgo. Tiu zorgo modifu kaj kvalifiku niajn dumkongresajn laborojn, kaj ĝi restu unu el la esencaj fundamentoj de nia vivo kiel junaj Esperanto-parolantoj.

En la pasinteco oni ofte utiligis lojalecon al TEJO kiel pretekston eviti la vere principajn mondajn demandojn. Ni retroiris malantaŭ la bastionon de neŭtraleco kaj vivis unu semajnon ĉiujare en ĉarma sed nereala mondo, interŝanĝante dum la cetero de la jaro ĉarmajn komunikojn egale nerealajn. Aliflanke, ĝuste la spirito de komuneco, la sento, ke ni entreprenas komunan batalon, estas grava ingredienco de nia agado. Tiun senton oni kreas interalie per la amuzaj eroj en nia kongresprogramo, aŭ en *Kontakt*. Tiuj eroj ne estas sanktaj: ili estas modifeblaj aŭ eĉ forigeblaj. Sed en la nuna stadio ili ludas sian rolon. Kvankam nia celo estas krei atmosferon de seriozeco en nia agado, ni vane klopodos tion fari se mankos al ni homoj por seriozigi.

El tiuj ĉi disaj pensoj pri prioritatoj venas firma konstato. Diversaj detaloj de nia agado ŝajnas bagatelaj, samkiel, ni diru, vermoj eble ŝajnas bagatelaj en la tuta strukturo de la naturo. Sed se oni forprenus ilin, la tuta ekvilibro de la naturo, la tuta ekvilibro de la organizo, estus alia. Se iu en fora mondparto ne diligente gluus poŝtmarkojn sur kovertojn, se iu en sia hejmloko ne aĉetus multobligan inkon kaj paperon, mankus Deklaracioj, kaj kongresoj, kaj ĉio kion ni, tro fidoplene, kutimiĝis akcepti kiel normalan.



Jen deklaroj de Tyresö, notitaj sur la kongresan „skribaĉvandon“ (selektaĵo el „Kvinpinto“).

Pri la slango de tejoanoj

Zamenhof kreis lingvon: statikan sistemon, enfermitan en sia unua lernolibro. La uzantoj — unue li mem — generis tekstojn skribe, poste ankaŭ parole, obeante la Zamenhofan aŭtomaton sed trafiltrante ilin tra siaj individuoj. Ju pli forte reliefigis la personaj trajtoj en la lingvouzo, des pli karaktera estis la lingvaĵo. Zamenhof ne povis krei stilon, nur sian propran. Sed la tekstoj de la lingvouzantoj iom post iom vestis diverskolorajn stilojn, facile distingeblajn, eĉ statistike esprimeblajn: ĉiu vera verkisto distingiĝas per pli-malpli propra tono.

La vivantaj kaj funkciantaj naciaj lingvoj realiĝas 75% akustike kaj nur 25% grafike. Verŝajne (fidindajn indikojn bedaŭrinde ni ne havas) en Esperanto la proporcio estas inversa: la Internacia Lingvo estas uzata ĉefe skribe (literaturo, korespondado ktp). La kaŭzo estas socia: maloftas tiaj situacioj, kiam la parola uzo estas neeviteble necesa. Sekve, se temas pri stilo en Esperanto oni nepre pensas pri ia literatura (skriba) stilo.

Sed: ĉu la stiltavoliĝo de Esperanto okazas nur laŭ opaj verkistoj en la kadroj de la beletristiko? Ĉu ne ekzistas krome ankaŭ ĵurnalistika, scienca, popular-scienca stiloj? Ĉu ne elformiĝis en Esperanto ia diferenco inter la skriba kaj parola stilo? Ĉu ne estas en Esperanto ĉiutaga parola stilo, familiara, oficiala ktp stiloj, ĵargonoj, frazeologio? Ĉu ekzistas aŭ povas esti en Esperanto infana lingvo?


Jen demandoĉeno atendanta respondaron.

Dum la 26-a TEJO-Kongreso (Graz, 10-17/8/1970) volevole mi rimarkis, ke la junularo havas specifan lingvaĵon, kiu diferencas per rimarkeblaj trajtoj de ĉiuj aliaj stiloj. La socia medio estis natura: ĉirkaŭ 150 gejunuloj, 18-25-jaraj, el dekoj da landoj kune vivis, amikiĝis, diskutis, amuziĝis. La lingvo estis tute vive, glate kaj nature uzata. Mi notis kelkajn karakterajn trajtojn:

- tendenco al la sintezaj formoj anstataŭ la analitikaj:
 „iru tag-vespermanĝejen . . .“ = al . . .
 „sloganmarŝo ĉefplacen . . .“ = al, sur . . .-on
 „invitatas, petatas . . .“ = estas . . .-ataj
 „se mi sciintus . . .“ = estus . . .-inta
- tipa junulara lingvouzo estas la aktivigo de sufiksoj -UM- kaj -AĴ-. Ilia necerta kaj elasta sememo, kun ia ŝercema, ironeca kaj sekreteca nuanco estas oportuna kiel iaj „kriptolingvaj elementoj“:
 „geumado, alielumi, ŝlosilumi“ = uzataj por esprimi la rilaton inter diversseksaj gejunuloj;
 „kotopoŝoj, kromaĵoj“ = denove kaŝas ideojn rekte ne esprimeblajn.
- estas rimarkebla la forta deziro paroli kiel eble plej flue kaj rapide. Por efektiviĝi la senintermitan parolkontinuon oni ofte uzas „parazite“ (nul-sememo) tiajn vortojn, kiel: „do, tamen“ kaj samcele la adverbojn „fakte, certe, nature, hazarde . . .“:
 „Fakte, vi ne iru, fakte, tien, ĉar, fakte, vi devas scii, do, ke tie . . .“
- la ironio kaj ŝercemo karakterizas ne nur la element-uzon kaj morfemo-kombinaĵojn sed ankaŭ la spritajn kaj subitajn frazojn, sentencojn:
 — ekzemploj el la kongresa dokumentaro —
 „Inaro certe estas agrablaĵo ĉe kunvenoj“
 „JES — mi preferus MALNE!“
 „Materialon pri la diskuttemoj vi povas ricevi ĉe . . . kaj kontraŭdormpilolojn ĉe LKK“

Verŝajne maturiĝis jam la tempo sondi multflanke la stiltendencojn en la Internacia Lingvo, ankaŭ en ĝia parola varianto. Ĉi artikoleto intencis nur atentigi kaj ne solvi.

I. Szerdahelyi
(el „Literatura Foiro“)



„Abstinu, kamaradoj! Ĉu vi forgesis, ke per volupto malkreskas via revolucia agresemo?”

H. M. Maitzen:

Kion fari post Graz?

TEJO inter miniklasbatalo kaj turismo

Ĉu la kongreso de Graz provokis gravan krizon ideologi-an en TEJO? Estas krizo, nepre, sed la alia demando tek-stas, ĉu tiu krizo ne tamen estas bona kaj progresiga kri-zo. La IJK Graz donis al la gekongresanoj unuafoje la eb-lecon de kunpuŝiĝo akra kaj senkaŝa kun formoj de ho-ma ekzisto, kiuj estas ekster la kutima vivosfero. La maŭ-ismo estis tre taŭga formo por ekigi la pensadon, por mobilizi la propran cerbon, kiu kutime dum IJK estas nur batalejo de amsentoj kaj alkoholaj pocentoj. La ana-lizo de la socia realo fare de la maŭismo estas taŭga hel-pilo por formi propran koncepton pri la socio. Certe, la maŭismo estas provoka, ĉar ĝi arogas esti la sole vera, la objektiva vero kaj la sola batalanto por la subpremata proletaro de la mondo. Mirinde la kongresanoj povis lerni, kiel plej bagatelaj aferoj de la ĉiutago tuj estas rilatigi-taj al la ideologia doktrino de la revoluciuloj.

La Deklaracio: ne por servi al „ideologia vero”

Necesas substreki: *la Deklaracio de Tyresö estas kaj res-tas* la baza dokumento de nia nova vojo. Kaj estas la tas-ko de TEJO ne permesi, ke certaj grupoj uzurpas kaj tor-das pere de ekstera ideologio ĝian enhavon. Estas aro da punktoj en la Deklaracio de Tyresö, kiu estas prisilenta-ta flanke de la uzurpantoj, ĉar ili ne harmonias kun ilia rigida koncepto.

La Deklaracio estos plue dokumento por socipolitika konsciigo de la junaj esperantistoj de la mondo, sed ne legitimilo por agoj, kiuj efektive kontraŭas la interesojn de la *homo*.

La Deklaracio estos dokumento por la agado kontraŭ la subfosado de la homeco sur la tero, sed ĝi ne estas papero por servi al „ideologia vero”.

La Deklaracio estos la elirpunkto por kontroli, kie kaj ki-om la ideologioj de la mondo detruas „la liberan evoluon de la individuo” kaj kie „la ĉirkaŭaĵo de la homo detruai-

ĝas kaj la homa psiko subfosigas”. Ĝi celas esti la gvidli-nio por aktivecoj, kiuj volas „plivastigi la dimension de la individuo”.

Necesas agi kun kaj per intelekto, kaj ne nur per ruĝaj flagoj kiel kvazaŭ-Dio por kontentigi siajn kompleksojn de malplivaloro.

Sekvante la enhavon de la Deklaracio de Tyresö ni TEJO-anoj havu malfermitajn okulojn kaj orelojn por la *realo* kaj poste klopodu akordigi kun ĝi nian agadon laŭ la sen-co de la Deklaracio.

En Graz montriĝis la adiaŭo for de la realo tre klare kaj nete ĉe niaj Maŭ-revoluciuloj. La tempo precize traktis *Ju-nularon* kaj *Lernejon* — *efon de la revolucio*. Pri la lerne-jo la k-doĵ-revoluciuloj tute ne volis paroli sekvante jenan tipe simpligan pensmanieron: „Lernejo estas parto de la socio, paroli pri lernejo kaj revolucio signifas paroli pri socio kaj revolucio, do ni parolu nur pri socio, t.e. la kla-soj de burĝoj kaj proletoj ktp., kaj revolucio. Se oni sol-vas la problemojn de la socio per la revolucio, aŭtomate solviĝas la problemoj de la lernejo!”

En tio montriĝas nete la emo eviti konkretajn problemojn kaj ŝvebi sur ruĝa tapiŝo tra la nuboj de la ideologia ĉielo. Ĝuste dum unu el la fakaj diskutoj (kiujn la sinjoroj-maŭ-istoj nature ne ĉeestis!) montriĝis ekzemple, kiel gravan moralan influon novaj instruteknologioj povas havi kaj kiel la lernejoj cirkonstancoj povas ŝanĝi aŭ krei novan homtipon.

Turismo: por eta kliko aŭ por la amasoj?

Sed nun finante la tutan komplekson de demandoj rilate al la „ideologio” de TEJO kun la alvoko daŭrigi la vojon komencitan per la Deklaracio de Tyresö, ni frontu la ali-an problemon de TEJO, nome la turismon. Oni mokadas flanke de la ideologiuloj pri turismaj TEJO-kongresoj, pri turisma popolo en TEJO kaj simile. Aliflanke necesas de-

mandi, ĉu turismo en TEJO fakte tiel enprofundiĝis, aŭ ĉu ĉion, kion ni faras sur turisma kampo, ni faras en nia eta rondo, ne pensante pri vastigo kaj havigo de niaj turismaj eblecoj al multe pli granda amaso da esperantistoj, sed ĉefe da ankoraŭ ne-esperantistoj. Leviĝas la demando, ĉu niaj turismaj aranĝoj servas nur etan klikon de TEJO-uloj, kiuj preferas tiun ĉarman rondeton, sed ne volas havi la amasojn en ĝi. Ni devas konscii, ke la riproĉo: „oni vidas ĉiam la samajn vizaĝojn ĉe vi“, ja estas malica, sed ne tute sen iom da vero.



Fakto, kiu tre malhelpas ekzemple niajn internaciajn junularajn kongresojn, estas, ke TEJO obeeme ĉiujare devas sekvi la elekton de UEA pri la kongresa lando. Tiel okazas, ke, malgraŭ la granda plimulto de junaj esperantistoj en socialismaj landoj, TEJO preskaŭ ĉiam devas kongresi en kapitalisma lando. La lasta kongreso en socialisma lando (Pécs) havis bulgaran partoprenon, kiu preskaŭ egalas al la tuta kongresanaro en Graz! Ni devas forigi la diskriminacion de niaj geamikoj el la socialismaj landoj, kaj okazigi pli ofte la IJK-on tie.

Alia aspekto estas la problemo de profesieco, kiel prave argumentis ĉe sia oratora konkurso la prezidanto de JEJA. Tiel longe, kiel niaj turismaj aranĝoj estas la amatora verko de unuopuloj farita per malbonaj rimedoj, tiel longe ni ne povas esperi pri vastigo de nia turismo, kaj sekve pri akiro de novaj membroj por TEJO.

Necesa paŝo estus la fondo de porjunulara vojaĝagentejo, kiu povus krom la koordinado de la jam ekzistantaj aranĝoj sisteme vastigi la reton de la ferieblecoj por junaj homoj, kiuj aŭ jam estas esperantistoj aŭ intencas fariĝi tiuj. Per ĝi oni povus kreskigi la necesan financon forton por aliaj agadoj de TEJO.

Ni povas esti kontentaj, ke kelkajn paŝojn en tiun direkton jam iris TEJO kaj ke la kunordigo de la ekzistantaj Esperantaj aranĝoj okazos ĉijare pere de turisma broŝuro de TEJO.

Se ni nun resumas la estontajn eblecojn de TEJO, tiam evidentiĝas la postulo havi la karakteron kaj vizaĝon de junulara organizaĵo internacia kaj internaciisma laŭ la Deklaracio de Tyresö, sed unu el la gravaj trajtoj de la ekzisto de TEJO devos esti la kunigo de la homoj ĉe la bazo de la internacia vivo, kaj tio estas la turismo. Se ni ĉiuj konsentas pri tiu pozicio, tiam la krizo de Graz estas jam venkita kaj montras perspektivon al pli fruktodona agado de TEJO ol iam antaŭe.

Vortoj de Prezidanto Jonas

Pri lernado

„Mi konstatis ĉe mi mem, kaj mi konstatis ĝis nun ĉe ĉiu kamarado manlaborista, ke ni en la Esperantokurso unue lernis nian gepatran lingvon kaj poste Esperanton.“

1926

„La perfektuloj neniam apartiĝu de la neperfektuloj, ĉar tio malkuraĝigas ĉi lastajn.“

1926

Pri la fina celo

„Kiel la socialismo kontentigos la sopiradon de milionoj da homoj je liberiĝo el ekonomia kaj kultura sklaveco, tiel same Esperanto plenumos la dumjarmilan sopiron je interkompreniĝo kun ĉio, kio portas homan vizaĝon.“

1926


„La organiza *fincelo* de nia movado nur povas esti la transpreno de nia afero en la taskaron de la potencaj laboristaj organizaĵoj, la *ideologia celo* de la laborista Esperantomovado estas: *Apliko de Esperanto en la socialista, senklasa mondo kiel internacia, supernacia interkompreniĝilo!*“

1926

Pri celo kaj rimedo

„Ni tial solene deklaras, ke ni unue estas socialistoj kaj poste esperantistoj. Kaj tial ni ne metas Socialismon en servon de Esperanto, sed Esperanton en servon de Socialismo.“

1932



Pri nia tasko

„Apliku Esperanton kiel esprimilon de internacia solidareco, klopodu ekkoni vian taskon: esti pioniroj de justeco, de paca kaj libera estonteco.”

1962

Pri nur-esperantisteco

„Oni ne povas esti nur-esperantisto, sed ankaŭ en la *kultura* movado de Esperanto oni devas esti proleta *klasbatalanto*.”

1931

8

Pri grupvesperoj

„La grupvespero estu kunveno de homoj kun samaj intencoj. Forestu la burĝa rigida formaleco, regu vera familia sento. Veku kaj flegu la solidarecon kaj la komunan senton.”

1926

Pri fideleco

„Kiam Esperanto ne povus esti batalilo por tiu granda armeo da socialistoj, kies simpla soldato mi estas, kiam Esperanto nur estus objekto de kulto kaj estus kaŭzo, ke nur dum unu minuto mi devus ignori mian mondrigardon pro falsa toleremo al nekunbatalantoj, tiam mi tuj forlasus Esperanton!”

1933

Pri la burĝa movado

„Nia rilato al la burĝa movado nur povas esti tiu de klara apartiĝo! La burĝa Esperantomovado hodiaŭ atingis bedaŭrindan staton de malalta nivelo. Certe tio ĝenerale estas signo de la degenero de la burĝa ideologio, kaj ni povas trankvile rezigni la spiritajn fortojn de la burĝaro.”

1926

Pri reakciuloj

„Esperanto en manoj de homoj pensantaj laŭ mezepoka idearo fariĝas helpilo kaj servilo de reakcio.”

1931

Pri IEMW

„Mi avertas la kamaradojn ne subteni tiun institucion. Ni ĉiuj bojkotu tiun entreprenon, kiun protektas personoj, kiel Seipel kaj Schober.”

1929

Pri honora protektanto

„La monopolhavantoj de neŭtraleco . . . petis Lian Moston, la marŝalon Pilsudski, la frenezan diktatoron de Polio, ke li transprenu *la honoran protekton* de la UEA-kongreso. Kaj li bonvolis akcepti. Zamenhof, ploru!”

1931

Pri kongresoj

„Kongreso de SAT ne estu okazo por amuzo kaj promeno. Seriozeco necesas, alie ni atingus baldaŭ la nivelon de UEA-kongreso.”

1929

Pri sennacieco

„Ĉu ni kunlaboru en tia organizo, kiam ni dum jaroj devas konstati, ke ‘Sennaciismo’ paralizas la fortojn de niaj plej bonaj kamaradoj?”

1933

“Mi fariĝis sennaciulo.”

1962

Pri SAT

„Kio restis en SAT: K-doĵ, kiuj al neniuj partio apartenas, do senpartiuoj, kiuj pro iuj sentimentalaj kaj individuistaj kaŭzoj faras ‘memstaran’ klasbatalon, mondreformantoj, fantaziuloj kaj ĉagreniĝintaj filantropoj. Ili montriĝis ĉiuj en SAT sub la masko de revoluciuloj.”

1933

„Tio estas la ĉefa, ke spite la ŝanĝiĝantaj kondiĉojn la idealo kaj celo de la laborista movado restas la samaj, kaj ke tiu sama idealo restas ankaŭ la idealo de la laborista Esperanto-movado, de SAT.”

1955



La Respektinda S . . . kaj la junularo

DUM LA LASTA JARO, kaj aparte — dum la lastaj monatoj, neniu alia filozofa aŭ verkisto kun monda famo estis tielgrade politike engaĝita, kiel estas Jean Paul Sartre. Sed tamen, ĉi tiu viro, kiu samaĝas kun Raymond Aron kaj Arthur Koestler, kaj konsiderinde pli junas ol Herbert Marcuse (kies kelkajn konceptojn pasie adoptis la revoluciema studentaro), ĉesis esti unu el tiuj personecoj, kiuj kapablas logi al si la hodiaŭan junularon. Multaj entreprenoj de Sartre provokis malpli da atento ol ekz. kampanjo de N. Mailer por la posteno de urbestro en Novjorko, malpli da intereso ol logis al si politikaj engaĝoj de Günter Grass. Evidentas, ŝajne, ke la stelo de Sartre estas ĉe sia subiro.

Dum la „revolucio“ en majo 1968, ĝiaj adeptoj diskutis multe pri tio kiel reagus Albert Camus, kiu pereis en 1960, ol kion opinias la vivanta Sartre. La poŝeldonoj de la verkoj de Camus vendiĝis konsiderinde pli bone ol la verkoj de Sartre. Ŝajnas, ke Camus, spite al tio ke lia voĉo mutas jam dekon da jaroj, estas pli proksima al la hodiaŭa junularo ol la ankoraŭ ĉiam aktivanta Sartre.

En la filozofiaj sferoj, la strukturalismo okupis tiun saman gvidpozicion kiun foje tenis la ekzistencialismo. Hodiaŭ la verko de Michel Foucault „Vortoj kaj aĵoj“ ĝuas la saman gloron kiun foje havis la ĉefverkoj de Sartre. La pli junaj francaj historiistoj estas en embaraso kiam temas pri la ideologia historiismo de Sartre, kaj, sekve, ili malofte cite rilatas al li. Ankaŭ la literaturaj kritikistoj nun malofte mencias tiun Sartre, kies eseoj siatempe estis epokfaraj. La „antisciencismo“ de Sartre kolizias kun la nuna ĝenerale pozitiva rilato al la ekzaktaj

Ĉu la gloro de la fama filozofa Sartre venas al sia fino? Kiel hodiaŭ rilatas al la granda filozofa kaj verkisto la franca intelektularo? Ĉu li estis, ĉu ankoraŭ li restas idolo de la ribelanta junularo?

sciencoj. Tie, kie la nuntempaj sciencistoj, aparte sociologoj, treege atentigas empiriajn faktojn, Sartre kun sia tuta grupo restas sen ajna eĥo. Samtiel, la novaj penskaj esplormanieroj, la novaj intelektulaj mitoj kaj metodoj, ne plu samas al tiuj, kiujn siatempe lanĉis kaj fekundigis Sartre. Sed, ĉio ĉi okazas ne pro tio, ke Sartre fariĝis celo de diversaj atakoj, sed pro la fakto, ke spite al la rekono, liaj ideoj kaj liaj agoj ne plu efikas tiel senpere kiel antaŭe.

Antaŭ kelka tempo, la magazino „Time“ publikigis ampleksan tekston pri Günter Grass. En la enkondukaj linioj de tiu teksto estis dirite, interalie: „Sartre delonge silentas.“ Tamen, nenio pli malĝustas ol ĉi tiu konstato, ĉar la franca filozofa neniam estis tiel aktiva kaj parolema kiel dum la lastaj monatoj. Sed, la „malĝustaĵo“ en „Time“ ne estas ja simpla eraro aŭ pretervido de la aŭtoro de tiu teksto; ĝi pravas, ke la aŭtoro atentigas lastatempajn emojn de la intelektularo: kvankam Sartre daŭre restas parolema, oni ne plu aŭskultas lin tiel atente kiel pli frue, kaj pro tio — li silentas eĉ kiam li parolas.

La francaj studentoj en 1968 rekomendis al Sartre „ke li iru dormi“. Kaj, antaŭ kelka tempo, François Mauriac, firma oponanto de Sartre, deklaris, ke la filozofa ne apartenas al tiuj homoj kiuj personigas potencon, sed al tiuj kiuj identiĝas kun la pacemo; li naskiĝis pli por esti sanktulo ol ribelanto.

Restas eksterdube, ke Sartre estas kontraŭdira personeco, kio evidentiĝas multe pli en liaj publikaj paŝoj ol en lia privata vivo. Li momente apogas la tiel nomatan maldekstrularon, kiu pledas por senpera apliko de la forto



aŭ „kontraŭforto“. Li, tamen, per kelkaj siaj starpunktoj klare distancigas de ili: Sartre pledas por la ekzistorajto de Israelo, dume „maŭistoj“, kies presajon Sartre mem distribuas, simpatias al la Palestina Liberiga Fronto, sen zorgoj eĉ pri eventuala ekstermo de Israelo. Sartre inklinas ankaŭ al „socialismo kun homaj trajtoj“ de Dubček, kion „maŭistoj“ deklaras pure „burĝa koncepto“ kaj „alprenado de nure okcidentaj valoroj“.

Sartre, kies starpunktoj en multo diversas kun tiuj de la revoluciema junulara movado, ne povas esti ĝia vera ideologo, sed sole ĝia pli-malpli valora kunlaboranto. Cetere, Sartre ĉiam pretis simpatii kun la revolucio, eĉ kiam ĝi montriĝis ekstrema, kio ja povus klarigi ankaŭ lian apogon al la francaj maŭistoj. Aliflanke, la filozofo ne tro alte taksas la Ruĝan Libreton de Maŭ, dirante, ke ĝi estas nenio alia ol „rimedo de amasa stultiĝo“.

Pro ĉiuj ĉi kontraŭdiroj Sartre konvenas nek al la nova kritikema tipo de la franca intelektulo, orientita pli al scienco ol al metafiziko, nek al tiu parto de la intelektularo kiu entuziasme revoluciemas. La unuaj interesiĝas pri problemoj kiujn Sartre dum sia tuta vivo preteradis kun fermitaj okuloj, la duaj nutras sin per mitoj kiuj lin mem ne povas entuziasmigi. Hodiaŭ neniu plu pensas sartrisme pri la historio, socio kaj literaturo, eĉ ne tiuj kiujn oni konsideras sartranoj. Observata de ekstere, hodiaŭ la filozofio de Sartre ne plu akceptiĝas kiel „projekcio“ (laŭ lia propra termino), sed kiel relikvo, kiel ero de la historio. Tial la novaperinta 750-paĝa kronologia bibliografio pri Sartre (eldonis Gallimard) venas en la ĝusta momento. Se ja temas pri Sartre, tiam alvenis la tempo por definitive resumi.

La junularo kiel forto por la paco

Legante unuafoje la revuon *Kontakto* (3/1969) estas ja ĝojiga afero. Feliĉe, ĝi montras la junularon marŝantan rekte antaŭen al celo neniam antaŭe tute plenumita, kun tiom da absoluta konvinko en la pravigo de siaj agadoj: „Tutmonda junularo sur la politika sceno, . . . batalanta kontraŭ tio, kio estas malbona en la mondo.“ Certe ne „tro reala, tro forta, spirite kaj taktike. . .“, sed treege forta kaj reala estu tiu movado, kiu celas *krei internacian amikecon kaj interkompreniĝon inter la junularo*. Por preni pozicion en la batalo kontraŭ la „establo“, oni bezonas preskaŭ superhoman fortecon. *Junularo kaj socio* kiel unika kombinaĵo devas trovi rimedon por la mond-paco per la forto de siaj firmaj konvinkoj, alivorte *forto por paco!* Sendube multaj forgesis, ke:

La Unuiĝintaj Nacioj proklamis la jaron 1967 *Jaro de internacia turismo*, kaj rekonis la turismon mem kiel *forton por paco*, sed, pro la pligrandiĝo de militagadoj ĉirkaŭ la mondo kaj la bedaŭrinda senpoveco inter la 126 membro-nacioj por deteni la perfortulojn, UN perdas multe da prestiĝo inter siaj plej bonaj amikoj.

Ankaŭ pro tio, la mondjunuloj fariĝas pli kaj pli senripozaj kaj moviĝemaj. La fakto estas, ke ili ne nur vojaĝas nuntempe (multaj el ili estas „pen-pals“, t.e., plum-kamaradoj), sed ankaŭ ĉeestas fremdajn lernejojn kaj kolegiojn laŭ la interŝanĝaj programoj de multaj nacioj. Ili vivtenas sin laŭ la kapablo kaj ne timas profiti ĉiujn okazojn por akceli siajn aferojn, kiuj inkluzivas ŝanĝi indiferentan kaj stagnan mondon. Por peni ŝanĝi

tiun mondon en pli bonan ordon, ili diligente serĉas manierojn kaj rimedojn por renversi jarmilan kutimon: la emon por militi anstataŭ intertrakti, laŭ la fama proklamo de William James: „Kion ni nun devas eltrovi en la socia regno, estas la morala korelativo de la milito; io heroo, kio parolos al la homo tiel universale kiel la milito kaj samtempe estos tiel akorda kun la spiritaj memoj, kiel la milito sin pruvis esti malakorda.“

En la teknologia socio de 1970, lige kun la momenta komunikado, kiu permesas al ni tuj ricevi mond-novaĵojn preskaŭ je la sama momento de okazo, la junuloj havis multe pli bonan ŝancon por atingi la celon: nome *pacon sur Tero*.

Ni do faru nian eblon por sukcesigi — ne nur la *internacian jaron de turismo* — sed ebligi la sukceson de ĉiuj jaroj kiel *forto por paco*. Jen fekunda tereno por varbi novajn adeptojn al nia interlingvo. TEJO mem fariĝas pli kaj pli potenca kaj alloga tiurilate, kaj — internacie — oni nur devas noti la sukceson de la Internaciaj Junularaj Kongresoj por elkompreni, ke TEJO veturas la ĝustan vojon!

Aliĝinte al TEJO oni vole-ne-vole havas la okazon vojaĝi. Ju pli oni vojaĝas, des pli oni edukiĝas; la vojaĝado mem estas la plej bona maniero por amikiĝi kun la mondo.


Se ni — esperantistoj — nur iomete evoluis el la mallumo, estas pro tio, ke niaj junuloj kuraĝas marŝi antaŭen en la sunlumo!

Elwyn C. Pollock (Usono)

Hans Zeilinger

La monstro de Port-au-Prince

Estis iam nigra kampara kuracisto, kiu vivis sur bela insulo kaj kiu dum 40 jaroj sindoneme kaj ofereme provis mildigi la psikajn kaj korpajn suferojn de malriĉuloj kaj malsanuloj. En lando, kiu de post la fondiĝo de la respubliko en la jaro 1803, spertis pli da brutaleco, korupto kaj diktatoreco ol kiu ajn en la mondo, tiu silentema viro estis rara ekzemplo. Tial do la homoj amis lin kaj donis al li kareseme la nomon „Papa Doc”, paĉjo kuracisto. Kaj kiam en la jaro 1957 ili la unuan fojon rajtis elekti demokrata, ili elektis lin prezidanto de Haitio. Tiun postenon la kuracisto ankoraŭ hodiaŭ okupas, eble okupos eĉ ĝis sia morto.



La palaco de la haitia diktatoro



Monstro en la rolo de anĝelo: Duvalier paradas antaŭ siaj subuloj.

Sed tie ĉi finiĝas la legendo pri la bonkora viro kaj tie ĉi komenciĝas la inkubo de Haitio. Tiu prezidanto, kiu tute ne plu havas iun similecon kun la milda kuracisto d-ro François Léon Duvalier, atingis dum tiuj 13 jaroj plian superlativon, sub lia regado Haitio evoluis de malriĉa lando al la verŝajne plej malriĉa lando nuntempe ekzistanta. Kaj neniu pridubas, ke lia reĝimo estas la plej kruela kaj plej malhumana sur la nuntempe terglobo.

Tamen, la historio de la libera Haitio komenciĝas per esperiga evento: inspirita per la franca revolucio, Toussaint l'Ouverture liberigis dum longaj sangaj bataloj la insulon de la franca regado. Ambaŭ invadintaj hispanaj kaj anglaj armeoj tiel forte estis venkitaj, ke la sendependeco de Haitio (siatempo ankoraŭ amplekante la tutan insulon) ne plu povis esti detruita. Sed Toussaint mortis, transportita al Francio, enkarcerigita en Fort Joux, tuberkulozmalsana. Depost tiam la sortoj de la plej multaj haitiaj ŝtatestroj estis similaj: generalo Desalines estis murdita en la jaro 1806. La posteulo, kiu nomis sin imperiestro Henriko I, mortpafis sin per propra ora kuglo. Kaj en la jaroj 1911-1915 unu ŝtatestro eksplodis kun sia palaco, lia posteulo mortis pro veneno, tri aliaj prezidantoj estis forigitaj per revolucioj. La plej kruelan prezidantomurdon Duvalier mem vidis en la aĝo de naŭ jaroj: bruanta homamaso eliris Velbrun-Guillaume el la palaco, kie li tremante kuŝis sub la lito; li finis sian vivon sub hakiloj kaj tranĉiloj.

Duvalier, elektita en 1963 prezidanto dumviva, decidis pli longe vivi ol ĉiuj prezidantoj de Haitio antaŭ li. La metodoj, kiuj helpu atingi tiun celon, estas klasikaj. Ili estas tre variaj, perfektaj, kaj ilin ligas unu baza komuna trajto: brutala subpremado de la popolo. Tiel Duvalier organizis privatan armeon de 12 000 senskrupuloj, plejparte civilaj milicianoj. La persona gardio ampleksas 800 virojn, kaj la plej timigan famon ĝuas trupo de 3000 profesiaj murdistoj, nomataj Tonton Macoutes. Ili laboras prefere dum la nokto, kaj turistoj, kiuj malgraŭ ĉiuj avertoj intencas enspiri la freŝan kariban aeron, ekkonos ilin tre facile pro sunokulvitroj. Eble tamen alia ekipaĵo estas pli okulfrapa, kompreneble: mitraletoj. Tiuj trupoj ĝis nun bone zorgis, ke la meznombra vivodaŭro de haitiano ne tro altiĝas, ĝi restas ankoraŭ ĉ. 32 jaroj.



La plej kutima vidaĵo en la „paradiza” pejzaĝo de Haitio.

La fondinto kaj organizinto de la sekreta polico, Clement Barbot, iama instruisto, cetere spertis sorton tipan por la ĉirkaŭaĵo de Duvalier. Kiam la diktatoro en 1969 longe malsanis pro koratako, Barbot anstataŭis lin kaj subpremis ribelan invadon. Sed Duvalier, resaniĝinte, ordonis lian enkarcerigon; li timis, ke Barbot ekhavis troan guston pri regado. La fino estis logika: Barbot post liberigo ĵuris eternan fidelon, sed unu tagon li surprizatakis aŭton, en kiu estis la plej junaj infanoj de Duvalier (sen plena sukceso cetere). Centoj da senkulpuloj malaperis la saman vesperon, la prezidanto mem venĝis. Por ĝenerala malstreĉiĝo Duvalier la venontan tagon ordonis eksterordinaran karnavalon.

Tiel aŭ simile finis sian vivon pli ol 2000 iamaj amikoj de Duvalier kaj eminentuloj de Haitio. La precizan nombron de ĉiuj viktimoj neniu scias, ĝi estas almenaŭ pli alta ol imageble. Ekster la ĉefurbo Port-au-Prince leviĝas la malpuraj muroj de Fort Dimanche: la Auschwitz de la demono doktoro. Kruele kaj histerie la prezidanto reagis je ĉiu ajn kritiko. Du studentojn, kiuj aŭdacis protesti per peniko kaj farbo sur domomuroj kontraŭ la reĝimo, li ankoraŭ la saman vesperon propramane torturis ĝis la morto.

Haitio povus esti paradizo: palmoj, floroj, Port-au-Prince situanta inter maro kaj montaro. Sed la rava vidaĵo trompas. La meznombra jara enspezo de haitiano ne superas 80 dolarojn, sekve la ŝtato apenaŭ povas postuli impostojn. Sed Haitio estas plenrajta membro de UN kaj de OAS, de la Organizo de Amerikaj Ŝtatoj. Kiam ekzemple Usono siatempe proponis eklogi Kubon el tiu organizo, Haitio estis la 14-a voĉo necesa por du-triona plimulto. Kiom tiu voĉo kostis ne estas konate, sed tuj poste Haitio ricevis usonan krediton pri 14 milionoj da dolaroj. Kvankam la jara enspezo de Duvalier „nur” estas 25 000 dolaroj, la duono de la nacia buĝeto atingas la privatajn pre-

zidantajn kontojn: 15 milionoj da dolaroj. Cetere, haitiaj moneroj apenaŭ ekzistas.

Intertempe la malprogreso daŭras. La lando suferas pro kronika manko de akvo, kanalizado kaj elektro. La ekzemplo de la elektra provizo simptome montras, ke la vorto „ekonomio” ne estas aplikebla en Haitio. Eĉ en la ĉefurbo ekzistas ĉiutage, ĝenerale vespere aŭ dum la nokto, malfunkcio de la elektro. Tial ankaŭ la telefona servo aŭ ne funkcias aŭ nur okaze. Sed ankaŭ la produktata elektro ne ĉiam atingas la destinitan lokon, pli ol la duono de kurento estas ŝtelata. Lertuloj forprenas ĝin el kondukiloj kaj vendas ĝin private.

François Duvalier, la civilizisto, la viro de la sorto, nedividebla flago de Haitio, kurentodonanto, la revoluciisto, edukisto, la stratokonstruisto (kaj tio nur estas parto de la oficiala nomokolekto) uzas siajn timigajn metodojn precipe por la publiko. Ĉiutaga radioelsendo pri Duvalier sonas kvazaŭ miksaĵo de Frankenstein-kaj „Dracula”-filmoj, la (ĉiam sama) fino resumu la (ĉiam diversan) enhavon: „Duvalier estas nevundebla. Kiu kontraŭas Duvalier, intencas detrui Haition kaj devas esti ekstermita.” La plej forta kolono de la reĝimo tamen estas unika en la mondo: Papa Doc faris la Vudu-religion instrumento de la psikologia teroro. Tiel la ĉefa tasko de la vudu-pastroj estas sugestii al la popolo, ke la prezidanto estas favorato de la dioj, ekipita per magiaj fortoj, aŭ eĉ estas iu „Zombie”, reviviĝinta mortinto. „Mi mem”, li deklaris, kiam J.F. Kennedy estis murdita en Dallas, „mortigis la usonan prezidanton per malbeno.”

Haitio — tio sonas kvazaŭ alia nomo por paradizo. Envere ĝi estas infero, kies plej eminenta viktimo Duvalier mem estas. Dum unu jaro nun li ne plu forlasis sian palacon, fantoma kastelo, kiu plenigas la landon per timo. Kaj en ĝi dume la malgranda nigra „Dracula” vivas por nur unu ideo: ekstermi ĉiujn malamikojn.

H.Z.

Stefan Maul

Danĝeraj revoj per drogoj

En la Mezepoko oni uzis sorĉ-trinkaĵojn kaj amstimulilojn. Hodiaŭ oni prenas drogojn kaj ebriiĝajn venenaĵojn. La UN-komisiono por esplorado de ebriiĝaj drogoj trovis, ke 80 procentoj de la konstatitaj maniuloj estas gejunuloj sub 25 jaroj. Dume ĉie oni propagandas, ke marihuano estas sendanĝera. Ĉu vere?

La plej ofta argumento de la propagandantoj estas: marihuano estas pli sendanĝera ol alkoholo. Tion konfirmas ankaŭ kuracistoj. Oni fervore forgesas nur, tiel argumentante, ke ja alkoholo ne estas sendanĝera . . .

Kion do diras la ĝisnunaj spertoj pri drogoj? Ekzemple tion, ke iu, kiu dum pli longa tempodaŭro regule prenas marihuanon, iun momenton ne plu estas kontenta pri la „sendanĝera“ cigaredo, sed transiras al pli fortaj, t.e. pli danĝeraj drogoj.

Ĉar la tiel nomataj ebriiĝaj venenoj (narkotikaĵoj, drogoj) estas tre diferencaj, laŭ efiko kaj danĝero ne kompareblaj, substancoj. Iuj el ili estas nek venenaj nek estigas ebrion. La plej gravaj estas:

- **Pervitino** aŭ aliaj „vekiloj“, kiuj ekzemple estis vaste uzataj en la hitlera armeo, kiun ili estis kondukantaj al la „finvenko“. Sed ĝia efiko rapide malkreskas ĉe ofta uzado.
- **Kokaino** (fabrikita el kokao) kaŭzas pli grandan sukces-kaj laborsenton, sed kondukas al rapida korpa kadukiĝo.
- **Marihuano**, pli ĝuste: kanabo; ekzistas du formoj: a) la rezina suko, nomata haŝiŝo, estas vendata kiel tranĉeblaj pladetoj; b) la polvo de la sekigitaj floroj, nomata marihuano. Aliaj nomoj estas „kif“, „herbo“ aŭ „fojno“, la kvalito dependas de la landa deveno, ekz. tre ŝatata estas la „ruĝa libana“ (nome haŝiŝo). Ambaŭ specoj, kiujn oni kutime fumas, povas kaŭzi eŭforion kaj ŝanĝon de la konscio.

- **LSD 25** estas artefarita (duonsinteza) drogo, kiu kaŭzas halucinaciojn (imagojn pri koloroj kaj sonoj, flugoj alten kaj en inferon, misajn imagojn pri spaco kaj tempo, sed ankaŭ angorojn). LSD-anoj parolas pri „trip“ (vojaĝo). Pli longtempa uzado kondukas al damaĝoj en la genoj, kies konsekvencoj povas esti misformoj de la idoj. Ankaŭ kancero kaj frenezo povas esti la sekvoj.
- **Opio** (Morfino, kodeino, heroino) estas la plej malnova konata ebriiĝa veneno. Eĉ militojn oni faris pro ĝi. Opio estas fabrikita el la papavo; kutime oni produktas fum-opion. El la kruda materialo oni produktas i.a. heroinon, kiun oni povas injekcii. Ĉe opio kaj la produktataj el ĝi drogoj la mani-danĝero estas plej granda. Se la maniuloj ne ricevas la kutiman kvanton, ili havas turmentajn korpajn kaj animajn suferojn. La maniulo estas katenita per la drogo kaj eĉ riskas perfortajn krimojn por havigi ĝin.

Kial oni uzas drogojn?

Certe la motivoj de la plimulto, ekz. lernantoj kaj studentoj, por uzi drogojn estas tutsimpla scivolemo, aventurismo k.s. Sed jen estas tuta aro de aliaj motivoj, kiujn oni povas resumi per „fuĝo el la realo“. La junularo de la tiel nomatan bonfarta aŭ konsum-socio, vaste karakterizita per la degenero de la aŭtoritato kaj la disfalo de la familio, volas trarompi aŭ eskapi la tiel malamatan, nekomprenatan mondon de la plenkreskuloj. Protesto kaj ribelo kaj la baldaŭ ekkonita senpovo kontraŭ la regantaj cirkonstancoj tro ofte kondukas en utopian ideomondon, en iluziojn kaj paradiz-revojn.

Tiu junularo malestimas la establitaron kaj provas ĉiamaniere provoki ĝin, esti alia: alia hararo, aliaj vestoj, alia vivmaniero. La mondo de la hipioj rekomendiĝas kiel no-



va, pli bela viv-maniero de paradizo kaj senkomplikeco. Fuĝo el la realo — tio ankaŭ estas la motivo por la minoritatoj, liberigi sin el la mizero de sia vivo. „Drogoj ĉiam estas plej forte konsumataj tie, kie grupoj sentas sin senrajtaj aŭ malprivilegiitaj: la kulio en Hongkongo, la kolorhaŭtuloj en la mizer-kvartaloj, sed ankaŭ intelektulaj grupoj, kiuj sentas sin progresemaj, sed senradikaj kaj senpotencaj — kiel estas ĉe parto de la junularo.” Tion diras la prezidanto de la san-oficejo de germana grandurbo.

En tiel nomataj artisto-rondoj LSD ne malofte fariĝas demando de la mondpercepto. Ili atentigas pri pli fruaj epokoj kaj iliaj granduloj: Beethoven prenis alkoholon, kial do *The Beatles* ne prenu marihuanon? La poetoj de Persio stimulis sin per opio, kial heroino ne same stimulu la pop-artistojn?

Sufiĉe supraĵa argumento, ĉar unuflanke ni ja nenion scias pri la sorto de la persaj poetoj, aliflanke montris eksperimentoj, ke artistoj sub drog-influo ja havas novajn kaj fascinajn imagojn, sed ke ili neniel povas uzi tiujn imagojn por iuj verkoj.

Ludo kun la morto

Sveda kuracisto, kiu ĉiutage havas maniajn pacientojn, skribas: „Kiu komencas uzi drogojn, ludas kun la morto, kun sia propra kaj tiu de aliaj. Sed kiu toleras tion, transprenas danĝeran respondecon.” Fakte sciencisto de la famkonata germana Max-Planck-Instituto, kiu dum jaroj esploras la efikojn de drogoj, trovis, ke eĉ la „sendanĝera” marihuano, prenita en altaj kvantoj, povas konduki rekte al morto; ĉar nur ĉ. 14 procentoj de la veneno forlasas la korpon rapide, dum la pli granda resto restas en la korpo. Se do dum pluraj jaroj sinsekvaj iu prenas marihuanon kaj havas ekz. malfortan koron, povas facile esti, ke li kolapsas.

Wolfram Kühn, psikiatro de la junular-oficejo de Hamburgo, vidas la ĉefan malbonaĵon de la marihuana misuzo en la karakterna nivel-perdo, la malvastiĝo de la intereso kaj la rezigno pri la socialaj interesoj — tio signifas: egoismo kaptas la personon. La tezon, ke ankaŭ marihuano estas danĝera pro la transiro al pli fortaj venenoj, subtenas esploroj en Usono, kie la duono de la heroin-manioj estas marihuan-fumintoj. Sed la Londona spertulo pri manioj Leech kontestas, ke temas pri aŭtomata sekvo. La veran danĝeron li vidas en la transiro de marihuano al LSD.

Kio momente estas ankoraŭ tro malmulte konata, estas la apudaj kaj postaj efikoj de la drogoj. D-ro J. Goddard, gvida drogo-esploristo, deklaras, ke „post malmultaj jaroj ni scios, ĉu ĝi [marihuano] estas danĝera aŭ ne”. Definitive.

Sed jen estas ankoraŭ aliaj danĝeraj faktoroj: la vendistoj. Ĉar kiu precize scias, kion li aĉetas, se li elspezas inter 3 kaj 8 germanajn markojn (ekz. en Germanio) por marihuano-cigaredo? Se estus pura marihuano . . . sed multaj vendistoj miksas en la marihuanon senvaloran materialon — aŭ opion, por fari la marihuanon-fumantojn maniaj kaj tiel teni ilin kiel klientojn.

Aliflanke oni ne troigu la danĝerojn. Certe ĉiu junul(in)o sciu pri la danĝeroj, sed foje fumi unu el tiuj „modaj” cigaredoj ne jam estas krimo; maksimume stultaĵo.

Stefan Maul



Forumo de legantoj For la idealistojn!

Kun granda intereso, eĉ dankemo, mi legis la vere bonvenigindan kaj atentindan artikolon pri „neŭtraleco“ (*Kontakto* 1/70).

Mi konkludas, ke la pure idealista ligo al Esperanto nepre devas ricevi la mortopuŝon, ĉar alie estas risko, ke Esperanto mem ricevos mortopuŝon. Feliĉe, pli kaj pli kreskas, dank' al la kreskado de socia konscio ĉe la junularo, la konvinkigo, ke Esperanto estas nedisŝireble ligita al ceteraj socifaktoroj, kaj tial estus vane rilati al Esperanto, kvazaŭ ĝi pendus en la aero sen ia socia bazo.

La idealistoj agis tro longe en nia historio! Certa grupo, tro granda eĉ, ligis al Esperanto faktorojn, kiuj ridindigis ĝian rolon, ridindigis la propagandistojn ĝenerale kaj

sekve fortimigis homojn, kiuj komence estis pozitive scivolemaj pri nia mondlingvo. Mi pensas ekz. pri la naiva kredo je la t.n. homaranismo, plue pri diversspecaj puritan-konceptoj: ekz. ke estas ia peko babili Esperanton kaj samtempe ŝati alkoholon. Entute tiu erara gvidprincipo, ke uzanto de Esperanto estas ia speciala „homtipo“! La paradokso estas: samtempe kiam multaj el ni provis arde konvinki eksterulojn, ke Esperanto estas plene vivanta lingvo kiel aliaj lingvoj, ni en diversaj okazoj agis kontraŭ niaj propagandaj eldiroj. Ekz. pluraj skribis kverelemajn leterojn al radiostacioj, plendante ke ili ne volas aŭskulti pri politikaj temoj en Esperanto. Do, subite Esperanto ne taŭgas por politikaj aferoj. Ridinde! La radiostacioj tutprave po-

stulas reeĥojn de siaj aŭskultantoj en formo de skribaĵoj. Feliĉe certa grupo de esperantistoj, kiuj nature rilatas al sia lingvo, mencias en siaj leteroj, ke ili ŝatis aŭ ne ŝatis dum elsendo tiun aŭ alian temon, kvazaŭ ili estus aŭskultintaj per sia nacia lingvo. Kontraŭe al tiu grupo, ankoraŭ ekzistas multaj esperantistoj, kiuj ŝajnas uzi Esperanton por hobieme interesiĝi ekskluzive pri Esperanto aŭ la vivo de la esperantistoj.

Kiam ĉiuj uzantoj de Esperanto *finfine* eklernos la nediskuteblan fakton, ke, ju pli kreskos la nombro kaj amplekso de *peresperantaj* eldonaĵoj aŭ agoj, des pli rapide kreskos la respekto al Esperanto kiel natura lingvo?

Bertil England (Svedio)

Minimumigi la malutilajn efikojn de la homa egoismo

El la artikoloj en *Kontakto* 4/69, „Lernejo — ejo de la revolucio“ kaj iom malpli „Komuneco“, parolas antropologio tre optimisma. Per sociaj reformoj ili opinias povi krei „novan homon“, „kiu nek sin mem nek la aliajn trompas“, „kies energio ne efikiĝas en agreso, sed en kreo de ĝojo kaj feliĉo“. La nova homo, koncize dirite, estos — kvankam mi dubas, ĉu Maitzen estas kristano — perfekta kristano, kiu amos sian plejproksimumon kiel sin mem — kvankam ĉiu scias, kiel malmultaj estas perfektaj kristanoj, kaj en la kristanaj eklezioj kaj ekster ili; la hinduo Gandhi estis proksima al tiu idealo. Kaj tiuj novaj homoj kune faros la mondon paradizo, sen malĝojo kaj konfliktoj. Ankaŭ Ŝtono instruas, ke la egoismon kaŭzas eraroj en la sociaj institucioj kaj ŝanĝo de la sociaj institucioj povos forigi.

Instruas male la kristanismo, ke la egoismo estas inherenta en la homa naturo. Ĉiu homo nature emas serĉi precipe sian propran profiton, kiom eble je la kosto de aliaj homoj. Ekzistas ja homoj tute vivantaj por aliaj kaj postulantaj por si mem nur la plejege necesan, ekz. Schweitzer kaj Martin Luther King, sed ili estas tiel maloftaj, ke ni havas nenian motivon kredi, ke iam la plimulto de la homoj estos tiaj. Sociaj institucioj povas iom bridi la egoismon, sed neniam forigi. Ĉiuj konsentas,

ke en la nuna mondo la plimulto de la homoj estas egoistoj. Nu, se novaj sociaj institucioj enkondukita en mondon de plejparte egoistoj apelacias al motivoj altruismaj, ili ne efikas, kaj se ili apelacias al motivoj egoismaj, ili daŭrigas la egoismon.

Mi mem tute ne estas kristano. Mi konsentas, ke la doktrinon de la inherenta egoismo (la tiel nomata „prapeko“) la kristano uzis tro ofte por pravigi indiferentecon por malbonaj sociaj institucioj, atribuante ĉiujn iliajn malbonajn efikojn al la neelradikigebla homa „pekemo“. Tion mi tute ne intencas. Mi konsentas, ke en kelkaj sociaj sistemoj la egoismo produktas malpli da malutilo ol en aliaj. Tamen principo la kristanismo estas tiurilate pli proksima al la vero ol la radikala optimismo de Maitzen — kiu havis pli eminentajn defendantojn per Rousseau kaj Marx. En ĉiu socia sistemo la egoismon de unu homoni povas bridi nur donante al aliaj homoj la potencon lin kontroli, kaj do kaŭzante malutilon pro la egoismo de la kontrolistoj. Kiu ne atentante tiun fakton kredas ebla ekstermi la egoismon kaj la interhomajn konfliktojn per ŝanĝo de la socia sistemo, estas same malsaĝa, kiel kiu klopodas ekstermi la krimon per polico, kiu estas mem same krimema kiel la krimistoj, kiujn ĝi devus bridi.

Ekzistas tiom da eblaj proponoj por sociaj

reformoj, ke certe en revuartikolo oni eĉ ne povas komenci detale pruvi por ĉiu unuope, ke ĝi ne produktos la „novan homon“, kiu amos sian plejproksimumon kiel sin mem kaj finos ĉiajn malfeliĉon kaj konfliktojn. Sed por multaj detaloj de la socia ordo pruvis la sperto, ke unu malbonon oni povas kontraŭbatali nur favorante alian malbonon, ke la du ekstremaj ebloj havas neakcepteblajn malavantaĝojn kaj ke meza vojo tenas la socion tolereble funkcianta, sed tute ne faras ĝin paradizo. Ekzemple en socio kun tro malgrandaj enspezaj diferencoj oni preskaŭ ne plu laboras (Sovet-Unio la unuajn jarojn post la revolucio) kaj en socio kun tro grandaj enspezaj diferencoj parto de la popolo mortas pro malsato. La plej profunda kaŭzo estas, ke en ambaŭ socioj la homoj montras sian egoismon: en troegaleca socio parazitante je la socio sen adekvataj kontraŭservoj, en socio stimulantanta ambicion batalante por pli bona pozicio por si mem, sen kompato por la malpli favoratoj.

Denove: mi ne estas kontraŭ sociaj reformoj. Sed racia socia reformismo devas celi minimumigi la malutilajn efikojn de la homa egoismo kaj forĵeti la ĥimeran esperon forigi la egoismon mem.

D-ro W.A. Verloren van Themaat
(Nederlando)



Landaj sekcioj de TEJO

Argentino: Bv. Oroño 866 „A”, Rosario.

Aŭstrio: H. Kovacic, Grazbachgasse 57, A-8010 Graz.

Aŭstralio: I. Heldzingen, Lot 7 Marville Court, Boronia 3155 Vic.

Belgio: P. Peeraerts, Drakenhoflaan 97, Deurne-Antwerpen.

Brazilo: Caixa Postal 18 - ZC 00, Rio de Janeiro.

Britio: M. Reed, MAP, University of East Anglia, Norwich NOR 88C.

Francio: 34, rue de Chabrol, Paris 10^e.

FR Germanio: Postfach 2113, D-85 Nürnberg 2.

Grekio: Agiu Meletiu 54, (814) Athenai.

Hispanio: S. Aragay, Bassegoda 40-3-1, Barcelona 14.

Hungario: Kenyérmező u. 6, Budapest VIII

Italio: Via Po 7, I-10124 Torino.

Japanio: Japana Esperanto-Instituto, Hongo 2-2-14, Bunkyō-ku, Tōkyō.

Jugoslavio: Amruševa 5/I, Zagreb.

Koreo: International P.O.Box 1232, Seoul.

Madagaskaro: B.P. 1399, Tananarive.

Meksiko: Calzada de Guadalupe no. 725, México 14, D.F.

Nederlando: W. Jansen, Röntgenstr. 32-A, Vlaardingen.

Nov-Zelando: P.O.Box 40-181, Upper Hutt.

Pollando: Jasna 6, Warszawa 1.

Svedio: T. Jansson, Bjässevägen 1 B, S-712 00 Hällefors.

Svisio: N. Margot, Ch. des Lys 4, CH 1010 Lausanne.

Usono: 4 Central Street, Millers Falls, Mass. 01349.

Ni timigu la burĝojn

La artikoloj en *Kontakto*, kiuj respegulas la manifestacion de la gejunuloj por Esperanto, estas aparte interesaj. Tute aprobinda estas la diro ke „la lingvo estas realaĵo intime ligita al aliaj sociaj kaj politikaj fenomenoj”.

Aliflanke, estus dezirinde, ke nia agado kontraŭ lingva imperiismo ne restu en la stadio de la bonaj rezolucioj, tamen nur taŭgaj por fermi debatojn. Ni devas kuraĝi agi kontraŭ la plenumiĝanta okazantaĵo, spiti la konservativulojn kaj timigi la burĝojn.

Kiel konkretan agadon, mi proponas lerni, konigi, kaj helpi disvolvi la lingvojn de la kulture subpremataj popoloj. Plue, per Esperanto, la kulture subpremataj popoloj povos aŭdigi siajn tiel ofte silentigitajn voĉojn kaj malkaŝi al la tuta mistifikita mondo la fiagojn de la grandpotencoj.

Mi alvokas ĉiujn sincerajn batalantojn al nova, entuziasmiga, neniam spertita laboro, nome, lerni, konigi, kaj helpi disvolvi la lingvojn de la kulture subpremataj popoloj, por ke fine aperu la vero; ĉu jes aŭ ne, ni, junaj geesperantistoj, antaŭ la tuta delogita mondo, estas pretaj oferi kaj dediĉi niajn kombinitajn etajn fortojn al tio kion

ni sentas justa. Tio estas unika ŝanco definitive montri, kiu favoras kiun. Se ni internaciuloj rezignos la por ni kvazaŭ devigan laboron, des pli neniu naciulo ĝin faros anstataŭ ni.

D. Cornice (Francio)

POR
VIAJ
KARAJ
GESAMI-
DEANOJ



Tial, ke mi estas nova esperantisto, kiu trovas grandan ĝojon en Esperanto, mi sendas al vi ĉi-kune mian foton en indiĝena araba kostumo, kaj petas al vi aperigi ĝin kiel kovrilfoto, tiel ke miaj karaj gesami-deanoj vidu min en mia nacia kostumo.

Himjar Al-Rašid (Irako)

Eskimoj abolas la anglan

La eskimaj infanoj en Alasko, eĉ en la plej foraj setlejoj, estos ne plu instruataj en la angla, sed en sia gepatra lingvo. Tiel ĵus decidis la edukaj aŭtoritatoj, post kiam evidentiĝis, ke per la anglalingva instruado praktike fremdiĝis por multaj infanoj iliaj propra lingvoj.

Transiro al la hejma lingvo en lernejoj necesigas ankaŭ radikale modifi la enhavon de la instrulibro, ĉar tiu de la ĝisnunaj ofte rilatas al aferoj ne tre intime konataj al eskimoj: fenestro-purigistoj, strando, maizo aŭ ĉielskrapulo apenaŭ taŭgas en la nordo.

Antaŭ unu jaro membroj de la Lingvistika Fakto de la Universitato de Alasko komencis okupiĝi pri eskima skribo-lingvo, utiligante (ĉefe) latinan alfabeton. Samtempe oni ektradukis infanlibrojn el la angla; anstataŭ „la urso”, en la rakontoj rolos nun polusa urso, kaj kiam en la originalo temas pri la vivo de kokinoj, oni transformos tiun specon al lagopo.

La pedagogoj en Alasko ne sekvas la agadon de siaj kanadaj kolegoj, kiuj enkondukis en eskimajn lernejojn alfabeton el simplaj anguloj kaj kurboj.

Nealiĝintaj sekcioj

Ĉeĥoslovakio: pk. 168, Praha 1.

DR Germanio: Charlottenstr. 60, DDR-108 Berlin.

Kolombio: J.F. Perrelet, Apartado aéreo 20532, Bogotá D.E. 2.

Norvegio: Boks 942, Oslo 1.

Sovet-Unio: V. Ŝilas, Dankanto 8-9, Vilnius 9.